

Joseph Döpjohann,  
La vojkruc

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Se renkontas vi voj-krucon,  
vi ekhaltu, preĝu vi;  
ĉiu strat' en via vivo  
venas sole ja de Di'.

Kruc' dum via vivo-vojo  
ofte ege premas vin;  
kaj ĝemante ĝin portante  
multaj ne eltenas ĝin.

Same kiel Li la dornan  
kronon portis kun sufer',  
prenu vian krucon vi sur  
via vojo sur la Ter'.

Vojo-krucoj estas signoj,  
starigitaj por honor'  
de ĉi tiu, kiu estas  
de la mondo la Sinjor'.

Tial antaŭ vojo-kruco  
manojn interplektu vi;  
preĝu, ke benitan finon  
grace donu al vi Di'.

*Traduko de la Basgermana poemo "Dat Wiägekrüüs" de JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, \*1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-272-551 (2005-01-17 13:54:37)*